

LA LITURGIO DE LA PASKA NOKTO

1. LA LUMORITO

Enkonduko

C: En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito.

K: Amen.

C: La Sinjoro estu kun vi.

K: Kaj kun via spirito.

C: Karaj gefratoj,

en la paska nokto Jesuo Kristo, nia Sinjoro, resurektis.

Li transiris de la morto al la vivo.

Pro tio la eklezio tra la tuta mondo taksas tiun ĉi nokton sankta.

Ĝi invitas siajn gefilojn, kie ajn ili logas, vigili kaj preĝi.

Ankaŭ ni, [komence de / meze en / fine de] la nokto, sekvis tiun inviton.

Ni nun volas

– kanti la laŭdon de la Resurektinto

– aŭskulti la vorton de Dio

– renovigi la kredkonfeson de nia bapto

– kaj celebri la eŭkaristion,

por ke ankaŭ ni transiru de la ombro al la lumo,

de la morto al la vivo.

Beno de la paska fajro

C: Ni preĝu.

Ho ĉiopova eterna Dio,

per Kristo Vi estas donacinta al ĉiuj, kiuj Vin kredas, la lumon de via gloro.

Bonvolu beni + tiun ĉi novan fajron, kiu heligas la nokton.


Ekflamigu en ni la sopiron pri Vi, la nepereonta lumo,

por ke estu puraj niaj koroj, kaj ni atingu la eternan Paskon

per Kristo, nia Sinjoro.

K: Amen.

Preparo de la paska kandelo



Kristo, hieraŭ kaj hodiaŭ,
komenco kaj fino.
Li estas la alfa,
Li estas la omega.
Liaj estas la jarmiloj,
Liaj la jarcentoj.
Lia estas la potenco,
Lia la gloro eterne.

1
4 2 5
3

Per Siaj sanktaj vundoj
brilantaj en gloro
gardu nin
kaj konservu nin
Kristo, la Sinjoro. Amen.




Kristo resurektis en gloro.
Lia lumo forpelu la tenebron de niaj koroj.

Eniro kun la paska kandelo

-> ADORU 313



aŭ:



Lumohimno (Exsultet)

plena formo



Ĝoj-kri - u, vi, ĉi-e-la an-ĝe-la a - ro. Ĝoj-kri - u,
 misteraj legia-roj de Di - o. Jen tri-um-fe ven-kis la
 re - ĝo. Ti - al so-nu, trom-bo-no de la sa - vo.
 Ek-ĝo - ju an-kaŭ, te-ro, per tia brilego ra-di-an-ta,
 per lu - mo de la eterna re-ĝo splen-dan-ta. Sci-u,
 ke for-i-ĝis mal-lu - mo i - am re-gin-ta tra la
 u - ni - ver - so. Ju-bi - lu, patrino e-kle-zi-o,
 ornamita per ti-a he-le - go. Laŭ-taj vo-ĉoj de la po -
 po - loj re - so-ni-gu ĉi ti - un aŭ - lon. Pro ti - o
 mi petas vin, ka-raĵ ge-fra-toj, kiuj staras en la mira
 klareco de tiu ĉi sank-ta lu - mo, vo-ku kun mi al la
 ĉiopo-va Di - o, pe - tante Lin pri Li - a kom - pa - to;

PASKA NOKTO

ke Li, kiu min sen mi - a me - ri - to degnis

enkorpiĝi en la nombron de la sa - cer - do - toj,
(di - a - ko - noj,)

ver - ŝu sur min la klarecon de Si - a lu - mo, por

ke mi plenumu la laŭdon de ĉi ti - u kan - de - lo.

La Sin - jo - ro es - tu kun vi. (Kaj kun vi - a spi - rit - o.)

Le - vi - ĝu vi - aj ko - roj. (Ni ha - vas ilin ĉe la

Sin - jo - ro.) Ni dan - ku al la Sin - jo - ro, ni - a Di - o.

(Estas in - de kaj jus - te.) Ve - re estas in - de

kaj jus - te, la nevideblan Dion, la ĉiopo - van Pa -

tron, kaj Lian ununas - ki - tan Fi - lon, nian Sinjoron

Jesu - o Kris - to, el tuta fervoro de la menso kaj

ko - ro kaj per la servo de la vo - ĉo pro - kla - mi.

PASKA NOKTO

Li solvis por ni la ŝuldon de nia prapa-tro A -
da - mo, kaj pie per Sia san - go forviŝis la praan
kul - po - de - kre - ton. Ve - nis nun la fes - to
de Pas - ko, dum kiu es - tas bu - ĉi - ta
tiu ve - ra ŝa - fi - do, per kies sango estas
konse - kra - taj la fostoj de la kre - dan - toj.
Jen — la nokt', en kiu unue niaj gepatroj, la gefiloj
de Iz - ra - e - lo, elkondukite el E - gip - tu - jo,
la Ma - ron Ru - ĝan sek - pi - e - de po - vis tra - i - ri.
Jen es - tas ti - u nokt', ki - u purigis la tenebron
de la pe - ku - loj, ĉar he - li - gis ĝin tiu
bri - la ko - lo - no. Es - tas la nokt', ki - u hodiaŭ

PASKA NOKTO



tra la uni-ver-sa kos-mo ĉiujn, kiuj je Kris-to

kre-das, a-partigas disde malvirto de la mondo

kaj malhelo de la pe-ko, re-gra-ci-gas,

li-gas de-no-ve al sank-te-co. Jen la nokt',

en kiu, detruinte la katenojn de la mor-to,

Kristo el in-fe-ro ven-ke as-cen-dis.

Ĉar senutile ni es-tus nas-ki-taj, se ni ne estus

profi-tin-taj de ti-u re-demp-to. Ho mira

estas ĉir-kaŭ ni la dig-no de la Di-a bo-ne-co.

Ho neestimebla karitato de la Pa-tro: Por

redempti la skla-von, Li trans-do-nis la Fi-lon.

Ho certe ne-ce-sa pe-ko de A-da-mo: Ĝin Kris-to

PASKA NOKTO

per Sia mor - to de - tru - is. Ho — eĉ feli - ĉa
 kul - po, kiu tian kaj tiel gran - dan re - demp - to - ron
 me - ri - tis. Ho — vere be - a - ta nokt', ki - u sola
 meritis scii tem - pon kaj ho - ron, en kiuj Kris - to
 resurek - tis el in - fe - ro. Jen la nokt', pri kiu es - tas
 skri - bi - te: La nokto estos iluminita ki - el ta - go,
 la nokto estos mia lumi - na - ĵo por mi - a de - li - co.
 La sanktigado de ti - u ĉi nok - to fu - ĝi - gas
 kri - mojn, for - la - vas kul - pojn, re - donas al
 glitstumblintaj sen - kul - pe - con, al aflik - ti -
 taj ga - je - con, pe - las mal - a - mon for, pre -
 pa - ras kon - kor - don, kur - bi - gas re - ĝi - mojn.

PASKA NOKTO

En tiu ĉi gra - ca nok - to akceptu, sankta Patro,
 tiun vesperan brul - o - fe - ron, la kandelon el la
 vak-so de l' a - be - loj, ki-un per la manoj de siaj ser-
 van - toj la sankta eklezio so - le - ne pre - zen - tas.
 Jen nun ni jam eksciis la himnon de tiu ĉi ko -
 lo - no, ki-un al la gloro de Di - o la ruĝa
 faj - ro bru - li - gis. Kvan-kam dividi-te en par - tojn,
 ĝi tamen ne su - fe - ris aj - nan di - fek - ton de
 lu - mo. Ĉar ĝi nutriĝas de la fandiĝan - ta vak - so,
 ki-un por la substanco de tiu ĉi altvalo - ra kan -
 de - lo, pa - tri - naj a - be - loj pro - duk - tis.
 Ho - vere be - a - ta nokt', ki-u prira - bis E - gip - tojn,
 ri - ĉi - gis He - bre - ojn; nok - to, en kiu tera kaj

PASKA NOKTO

ĉi - e - la, ho - ma kaj Di - a sin li - gas.
 Ni petas Vin do, ho Sin - jo - ro, ke tiu ĉi kandelo,
 honore al Via nomo kon - se - kri - ta, sen - di - fek - te
 per - sis - tu, por ke ĝi de - tru - u la nok - tajn
 te - ne - brojn. Kaj akceptite kiel dolĉe odorant - a
 o - fe - ro, ĝi mik - si - ĝu kun la ĉi - e - la
 lu - ma - ro. Fla - mojn ĝi - ajn tro - vu la ste - lo
 ma - te - na, la vera mate - na ste - lo, kiu ne -
 ni - am sub - i - ras, Je - suo Kristo, Vi - a Fi - lo,
 ni - a Sin - jo - ro, ki - u resurektis el la mor -
 tin - toj, ki - u ekbrilas al la homaro en pas - ka
 lu - mo, ki - u kun Vi vivas kaj re - gas nun kaj
 e - ter - ne. (A - men.)

aŭ:

Lumohimno (Exsultet)






por kunlegi, dum la diakono kantas

Ĝojkriu, vi, ĉiela anĝela aro.
Ĝojkriu, misteraj legiaroj de Dio.
Jen triumfe venkis la reĝo.
Tial sonu, trombono de la savo.

Ekĝoju ankaŭ, tero, per tia brilego radianta,
per lumo de la eterna reĝo splendanta.
Sciu, ke foriĝis mallumo iam reginta tra la universo.

Jubilu, patrino eklezio,
ornamita per tia helego.
Laŭtaj voĉoj de la popoloj resonigu ĉi tiun aŭlon.

Pro tio mi petas vin, karaj gefratoj,
kiuj staras en la mira klareco de tiu ĉi sankta lumo,
voku kun mi al la ĉiopova Dio,
petante Lin pri Lia kompato;
ke Li, kiu min sen mia merito degnis enkorpiĝi en la nombron de la sacerdotoj,
verŝu sur min la klarecon de Sia lumo,
por ke mi plenumu la laŭdon de ĉi tiu kandelo.



Vere estas inde kaj juste,
 la nevideblan Dion, la ĉiopovan Patron,
 kaj Lian ununaskitan Filon, nian Sinjoron Jesuo Kristo,
 el tuta fervoro de la menso kaj koro
 kaj per la servo de la voĉo proklami.

Li solvis por ni la ŝuldon de nia prapatro Adamo,
 kaj pie per Sia sango forviŝis la praan kulpodekreton.

Venis nun la festo de Pasko,
 dum kiu estas buĉita tiu vera ŝafido,
 per kies sango estas konsekrataj la fostoj de la kredantoj.

Jen la nokt',
 en kiu unue niaj gepatroj, la gefiloj de Izraelo,
 elkondukite el Egiptujo,
 la Maron Ruĝan sekpiede povis trairi.

Jen estas tiu nokt',
 kiu purigis la tenebron de la pekuloj,
 ĉar heligis ĝin tiu brila kolono.

Estas la nokt',
 kiu hodiaŭ tra la universa kosmo ĉiujn, kiuj je Kristo kredas,
 apartigas disde malvirto de la mondo kaj malhelo de la peko,
 regracigas,
 ligas denove al sankteco.

Jen la nokt',
 en kiu, detruinte la katenojn de la morto,
 Kristo el infero venke ascendis.
 Ĉar senutile ni estus naskitaj,
 se ni ne estus profitintaj de tiu redempto.

Ho mira estas ĉirkaŭ ni la digno de la Dia boneco.
 Ho neestimebla karitato de la Patro:
 Por redempti la sklavon, Li transdonis la Filon.

Ho certe necesa peko de Adamo:
 Ĝin Kristo per Sia morto detruis.
 Ho eĉ feliĉa kulpo,
 kiu tian kaj tiel grandan redemptoron meritis.

Ho vere beata nokt',
 kiu sola meritis scii tempon kaj horon,
 en kiuj Kristo resurektis el infero.

Jen la nokt',
 pri kiu estas skribite:
 La nokto estos iluminita kiel tago,
 la nokto estos mia iluminaĵo por mia delico.


La sanktigado de tiu ĉi nokto
 fuĝigas krimojn,
 forlavas kulpojn,
 redonas al glitstumblintaj senkulpecon,
 al afliktitaj gajecon,
 pelas malamon for,
 preparas konkordon,
 kurbigas reĝimojn.

En tiu ĉi gracia nokto
 akceptu, sankta Patro, tiun vesperan bruloferon,
 la kandelon el la vakso de l' abeloj,
 kiun per la manoj de siaj servantoj
 la sankta eklezio solene prezentas.

Jen nun ni jam eksciis la himnon de tiu ĉi kolono,
 kiun al la gloro de Dio la ruĝa fajro bruligis.
 Kvankam dividite en partojn,
 ĝi tamen ne suferis ajnan difekton de lumo.
 Ĉar ĝi nutriĝas de la fandiĝanta vakso,
 kiun por la substanco de tiu ĉi altvalora kandelo,
 patrinaj abeloj produktis.

Ho vere beata nokt',
 kiu prirabis Egiptojn,
 riĉigis Hebreojn;
 nokto, en kiu tera kaj ĉiela,
 homa kaj Dia sin ligas.

Ni petas Vin do, ho Sinjoro,
 ke tiu ĉi kandelo, honore al Via nomo konsekrita,
 sendifekte persistu,
 por ke ĝi detruu la noktajn tenebrojn.
 Kaj akceptite kiel dolĉe odoranta ofero,
 ĝi miksiĝu kun la ĉiela lumaro.
 Flamojn ĝiajn trovu la stelo matena,
 la vera matena stelo, kiu neniam subiras,
 Jesuo Kristo, Via Filo, nia Sinjoro,
 kiu resurektis el la mortintoj,
 kiu ekbrilas al la homaro en paska lumo,
 kiu kun Vi vivas kaj regas nun kaj eterne.



K: A - men.

aŭ:






Lumohimno (Exsultet)

mallonga versio:

Ĝojkriu, vi, ĉiela anĝela aro.
 Ĝojkriu, misteraj legiaroj de Dio.
 Jen triumfe venkis la reĝo.
 Tial sonu, trombono de la savo.

Ekĝoju ankaŭ, tero, per tia brilego radianta,
 per lumo de la eterna reĝo splendanta.
 Sciu, ke foriĝis mallumo iam reginta tra la universo.

Jubilu, patrino eklezio,
 ornamita per tia helego.
 Laŭtaj voĉoj de la popoloj resonigu ĉi tiun aŭlon.



Vere estas inde kaj juste,
 la nevideblan Dion, la ĉiopovan Patron,
 kaj Lian ununaskitan Filon, nian Sinjoron Jesuo Kristo,
 el tuta fervoro de la menso kaj koro
 kaj per la servo de la voĉo proklami.

Li solvis por ni la ŝuldon de nia prapatro Adamo,
 kaj pie per Sia sango forviŝis la praan kulpodekreton.

Venis nun la festo de Pasko,
dum kiu estas buĉita tiu vera ŝafido,
per kies sango estas konsekrataj la fostoj de la kredantoj.

Jen la nokt',
en kiu unue niaj gepatroj, la gefiloj de Izraelo,
elkondukite el Egiptujo,
la Maron Ruĝan sekpiede povis trairi.

Jen estas tiu nokt',
kiu purigis la tenebron de la pekuloj,
ĉar heligis ĝin tiu brila kolono.

Estas la nokt',
kiu hodiaŭ tra la universa kosmo ĉiujn, kiuj je Kristo kredas,
apartigas disde malvirto de la mondo kaj malhelo de la peko,
regracigas,
ligas denove al sankteco.

Jen la nokt',
en kiu, detruinte la katenojn de la morto,
Kristo el infero venke ascendis.

Ho mira estas ĉirkaŭ ni la digno de la Dia boneco.
Ho neestimebla karitato de la Patro:
Por redempti la sklavon, Li transdonis la Filon.

Ho certe necesa peko de Adamo:
Ĝin Kristo per Sia morto detruis.
Ho eĉ feliĉa kulpo,
kiu tian kaj tiel grandan redemptoron meritis.


La sanktigado de tiu ĉi nokto
fuĝigas krimojn,
forlavas kulpojn,
redonas al glitstumblintaj senkulpecon,
al afliktitaj gajecon.

Ho vere beata nokt',
en kiu tera kaj ĉiela, homa kaj Dia sin ligas.

En tiu ĉi gracia nokto
akceptu, sankta Patro, tiun vesperan bruloferon,
la kandelon el la vakso de l' abeloj,
kiun per la manoj de siaj servantoj
la sankta eklezio solene prezentas.

PASKA NOKTO

Ni petas Vin do, ho Sinjoro,
ke tiu ĉi kandelo, honore al Via nomo konsekrita,
sendifekte persistu,
por ke ĝi detruu la noktajn tenebrojn.
Kaj akceptite kiel dolĉe odoranta ofero,
ĝi miksiĝu kun la ĉiela lumaro.
Flamojn ĝiajn trovu la stelo matena,
la vera matena stelo, kiu neniam subiras,
Jesuo Kristo, Via Filo, nia Sinjoro,
kiu resurektis el la mortintoj,
kiu ekbrilas al la homaro en paska lumo,
kiu kun Vi vivas kaj regas nun kaj eterne.



2. LA LITURGIO DE LA VORTO

Enkonduko

En ĉi sanktega noktoj, karaj gefratoj,
la eklezio malfermas abunde la trezoron de la Dia vorto.

Ni aŭdos [sep] legaĵojn el la Malnova Testamento:

- la poemon pri la kreado de la mondo
- la rakonton pri la kredo kaj fido de Abrahamo
- la konfeson pri la mirindaĵoj de Dio por Sia popolo dum la eliro
- vorton el Jesaja pri nova interligo
- profetan himnon el Jesaja pri la forto de la Dia vorto
- tekston el Baruh pri la irado laŭ la lumigaj ordonoj de Dio
- la vorton el Jehezkel pri nova koro kaj nova spirito

Sekvos du legaĵoj el la Nova Testamento:

- la mesaĝo de Paŭlo pri nia morto kaj vivo en Kristo
- kaj la evangelio pri la resurekto de Jesuo Kristo

Legajaĵo el la libro Genezo

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron.

Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo.

Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo. Kaj Dio nomis la lumon Tago, kaj la mallumon Li nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago.

Kaj Dio diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo. Kaj Dio kreis la firmaĵon, kaj apartigis la akvon, kiu estas sub la firmaĵo, de la akvo, kiu estas super la firmaĵo; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio nomis la firmaĵon Ĉielo. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago.

Kaj Dio diris: Kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj aperu la sekaĵo; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio nomis la sekaĵon Tero, kaj la kolektiĝojn de la akvo Li nomis Maroj. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona.

Kaj Dio diris: Kreskigu la tero verdaĵon, herbon, kiu naskas semon, fruktarbon, kiu donas laŭ sia speco frukton, kies semo estas en ĝi mem, sur la tero; kaj fariĝis tiel. Kaj la tero elkreskigis verdaĵon, herbon, kiu naskas semon laŭ sia speco, kaj arbon, kiu donas frukton, kies semo estas en ĝi mem laŭ sia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.

Kaj Dio diris: Estu lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo, por apartigi la tagon de la nokto, kaj ili prezentu signojn, tempojn, tagojn, kaj jarojn; kaj ili estu lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo, por lumi super la tero; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio faris la du grandajn lumaĵojn: la pli grandan lumaĵon, por regi la tagon, kaj la malpli grandan lumaĵon, por regi la nokton, kaj la stelojn. Kaj Dio starigis ilin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ili lumu sur la teron, kaj por ke ili regu la tagon kaj la nokton kaj faru diferencon inter la lumo kaj la mallumo. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.

Kaj Dio diris: La akvo aperigu moviĝantaĵojn, vivajn estaĵojn, kaj birdoj ekflugu super la tero, sub la ĉiela firmaĵo. Kaj Dio kreis la grandajn balenojn, kaj ĉiujn vivajn estaĵojn moviĝantajn, kiujn aperigis la akvo, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn flugilhavajn birdojn laŭ ilia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. Kaj Dio ilin benis, dirante: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la akvon en la maroj, kaj la birdoj multiĝu sur la tero. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.

Kaj Dio diris: La tero aperigu vivajn estaĵojn, laŭ ilia speco, brutojn kaj rampaĵojn kaj surterajn bestojn, laŭ ilia speco; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio kreis la bestojn de la tero, laŭ ilia speco, kaj la brutojn, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn rampaĵojn de la tero, laŭ ilia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin. Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj en la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero.

Kaj Dio diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo. Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon. Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.

Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris. Kaj Dio benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis de Sia tuta laboro, kiun Li faris kreante.

Tia estas la naskiĝo de la ĉielo kaj la tero, kiam ili estis kreitaj.

aŭ mallonga versio:

Unua legaĵo

Gen 1,1.26-31a

Legajaĵo el la libro Genezo

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron.

Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.

Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj en la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero.

Kaj Dio diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo. Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon. Kaj fariĝis tiel.

Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona.

¶ Antifono

-> ADORU 313.1

VIIIa El - sen - du Vi - an Spi - ri - ton, kaj i -
VIII ĝos no - va la vi - za - ĝo de la te - ro.

el Psa 104

VIII sol.
VIII

Ho Eternulo, mia Dio, Vi estas tre granda, *
De majesto kaj beleco Vi estas vestita;

Vi, kiu estas ĉirkaŭkovrita de lumo kiel de vesto,
Kiu sternas la ĉielon kiel tapiŝon. ¶

Vi fondis la teron sur ĝiaj fundamentoj, *
Ke ĝi neniam ŝanceliĝos.

La abismon Vi kovris kiel per vesto, *
Sur la montoj staras akvo. ¶

Vi sendas fontojn al la riveroj, *
Kiuj iras inter montoj;

Apud ili loĝas la birdoj ĉielaj, *
El inter la branĉoj ili sonigas sian voĉon. ¶

Vi trinkigas la montojn el Viaj ĉambroj; *
Per la produktoj de Viaj faroj satiĝas la tero.

Vi kreskigas herbon por la bruto, *
Kaj verdaĵon, kiu servas al la homo. ¶

Kiel multaj estas Viaj faroj, ho Eternulo! † Ĉion Vi faris kun saĝo; *
La tero estas plena de Viaj faritaĵoj.

Benu, ho mia animo, la Eternulon. *
Ho Eternulo, mia Dio, Vi estas tre granda. ¶

aŭ:


¶ Antifono

-> ADORU 879.29



Va Ĝo - ju, sank - ta gen - to,
de Di - o e - lek - ti - ta.

el Psa 33



V+ Ĉar ĝusta estas la vorto de la Eternulo, *
Kaj ĉiu Lia faro estas fidinda. **
Li amas justecon kaj juĝon; ***
La tero estas plena de la boneco de la Eternulo. ¶

Ĉar ĝusta estas la vorto de la Eternulo, *
Kaj ĉiu Lia faro estas fidinda. **
Li amas justecon kaj juĝon; ***
La tero estas plena de la boneco de la Eternulo. ¶

Per la vorto de la Eternulo estiĝis la ĉielo; *
Kaj per la spiro de Lia buŝo estiĝis ĝia tuta ekzistantaro. **
Li kolektis kiel en tenujon la akvon de la maro, ***
Li metis la abismojn en konservejojn. ¶

Feliĉa estas la popolo, kies Dio estas la Eternulo; *
La gento, kiun Li elektis al Si kiel heredon. **
El la ĉielo la Eternulo rigardas, ***
Li vidas ĉiujn homidojn. ¶

Nia animo fidus la Eternulon; *
Li estas nia helpo kaj nia ŝildo. **
Via favoro, ho Eternulo, estu super ni, ***
Kiel ni al Vi esperas. ¶

Ni preĝu.

Ho ĉiopova eterna Dio,
mirinda Vi estas en ĉiuj Viaj faroj.
Bonvolu ekkonigi nin, Viajn redemptitojn,
ke pli granda ol tio, kion Vi faris en la komenco de la mondo,
estas tio, kion en la fino de la tempo Vi faris per nia paska Ŝafido Jesuo Kristo
kiu sin mem oferis por ni,
Li, kiu vivas kaj regas eterne.
Amen.

aŭ post la mallonga versio:

Ni preĝu.

Ho ĉiopova Dio,
mire Vi kreis la homojn, pli mire Vi redemptis ilin.
Bonvolu helpi al ni, kontraŭstari al la allogo de la peko per la forto de la Spirito,
por ke ni atingu la ĝojon eternan.
Pri tio ni petas per Kristo, nia Sinjoro.
Amen.

Legajaĵo el la libro Genezo

Post tiuj okazintaĵoj Dio provis Abrahamon, kaj diris al li: Abraham! Kaj tiu respondis: Jen mi estas. Kaj Li diris: Prenu vian filon, vian solan, kiun vi amas, Isaakon, kaj iru en la landon Morija, kaj oferu lin tie kiel bruloferon sur unu el la montoj, kiun Mi montros al vi.

Kaj Abraham leviĝis frue matene kaj selis sian azenon kaj prenis siajn du junulojn kun si kaj sian filon Isaak; kaj li fendis lignon por brulofero, kaj leviĝis kaj iris al tiu loko, pri kiu diris al li Dio. En la tria tago Abraham levis siajn okulojn kaj ekvidis la lokon de malproksime. Kaj Abraham diris al siaj junuloj: Restu ĉi tie kun la azeno, kaj mi kun la knabo iros tien, kaj ni adorkliniĝos kaj revenos al vi.

Kaj Abraham prenis la lignon por la brulofero kaj metis ĝin sur sian filon Isaak, kaj li prenis en sian manon la fajron kaj la tranĉilon; kaj ili iris ambaŭ kune. Kaj Isaak diris al sia patro Abraham: Mia patro! Kaj tiu respondis: Jen mi estas, mia filo. Kaj li diris: Jen estas la fajro kaj la ligno, sed kie estas la ŝafo por la brulofero? Kaj Abraham diris: Dio antaŭvidos al Si la ŝafon por la brulofero, mia filo. Kaj ili iris ambaŭ kune.

Kaj ili venis al la loko, pri kiu diris al li Dio; kaj Abraham konstruis tie la altaron kaj surmetis la lignon, kaj ligis sian filon Isaak kaj metis lin sur la altaron super la ligno.

Kaj Abraham etendis sian manon kaj prenis la tranĉilon, por buĉi sian filon. Kaj ekvokis al li anĝelo de la Eternulo el la ĉielo, kaj diris: Abraham, Abraham! Kaj li respondis: Jen mi estas. Kaj Tiu diris: Ne etendu vian manon sur la knabon, kaj faru al li nenion; ĉar nun mi scias, ke vi timas Dion kaj vi ne indulgis pro Mi vian filon, la solan.

Kaj Abraham levis siajn okulojn, kaj vidis, ke jen virŝafo malantaŭe implikiĝis per la kornoj en la arbetoj. Kaj Abraham iris kaj prenis la virŝafon, kaj oferis ĝin kiel bruloferon anstataŭ sia filo.

Kaj Abraham donis al tiu loko la nomon: La Eternulo Vidas; tial oni ankoraŭ nun diras: Sur la monto, kie la Eternulo aperas.

Kaj denove anĝelo de la Eternulo vokis al Abraham el la ĉielo, kaj diris: Mi ĵuras per Mi, diras la Eternulo, ke ĉar vi faris tiun aferon kaj ne indulgis vian filon, la solan; tial Mi benos vin kaj Mi multigos vian idaron simile al la steloj de la ĉielo kaj al la sablo sur la bordo de la maro; kaj via idaro posedos la pordegojn de siaj malamikoj. Kaj beniĝos per via idaro ĉiuj popoloj de la tero, pro tio, ke vi obeis Mian voĉon.

aŭ mallonga versio:

Dua legaĵo

Gen 22,1-2.9a.10-13.15-18

Legajaĵo el la libro Genezo

Post tiuj okazintaĵoj Dio provis Abrahamon, kaj diris al li: Abraham! Kaj tiu respondis: Jen mi estas. Kaj Li diris: Prenu vian filon, vian solan, kiun vi amas, Isaakon, kaj iru en la landon Moriĵa, kaj oferu lin tie kiel bruloferon sur unu el la montoj, kiun Mi montros al vi.

Kaj ili venis al la loko, pri kiu diris al li Dio.

Kaj Abraham etendis sian manon kaj prenis la tranĉilon, por buĉi sian filon. Kaj ekvokis al li anĝelo de la Eternulo el la ĉielo, kaj diris: Abraham, Abraham! Kaj li respondis: Jen mi estas. Kaj Tiu diris: Ne etendu vian manon sur la knabon, kaj faru al li nenion; ĉar nun mi scias, ke vi timas Dion kaj vi ne indulgis pro Mi vian filon, la solan.

Kaj Abraham levis siajn okulojn, kaj vidis, ke jen virŝafo malantaŭe implikiĝis per la kornoj en la arbetoj. Kaj Abraham iris kaj prenis la virŝafon, kaj oferis ĝin kiel bruloferon anstataŭ sia filo.


Kaj denove anĝelo de la Eternulo vokis al Abraham el la ĉielo, kaj diris: Mi ĵuras per Mi, diras la Eternulo, ke ĉar vi faris tiun aferon kaj ne indulgis vian filon, la solan; tial Mi benos vin kaj Mi multigos vian idaron simile al la steloj de la ĉielo kaj al la sablo sur la bordo de la maro; kaj via idaro posedos la pordegojn de siaj malamikoj. Kaj beniĝos per via idaro ĉiuj popoloj de la tero, pro tio, ke vi obeis Mian voĉon.

¶ Antifono

-> ADORU 313.2



el Psa 16



La Eternulo estas mia sorta parto kaj kaliko; *
Vi subtenas mian sorton.

Çiam mi vidas la Eternulon antaŭ mi; *
Çar Li estas çe mia dekstra mano, mi ne falos. ¶

Tial gojas mia koro, raviĝas mia animo; *
Eç mia karno ripozas senzorge.

Çar Vi ne lasos mian animon al Ŝeol; *
Vi ne permesos, ke Via sanktulo forputru. ¶

Mi diris al la Eternulo: Vi estas mia Sinjoro; *
Mi ne havas alian bonon krom Vi.

Vi konigos al mi la vojon de la vivo; † Multe da gojoj estas antaŭ Vi, *
Çarmoj estas en Via dekstra mano eterne. ¶

Ni preĝu.

Ho Dio, Patro de la fideluloj,
per Via graco vi plimultigas ĉie sur la terглоbo la idojn de Via promeso.
La ĵuron, kiun Vi ĵuris al Abraham, vi plenumas per la sakramento de la bapto,
kaj tiel Vi faras lin patro de ĉiuj popoloj.
Donacu al ĉiuj, kiujn Vi vokis en Vian popolon, la gracon sekvi tiun ĉi vokon.
Pri tio ni petas per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Legaja el la libro Eliro

Tiam Moseo diris al la popolo: Ne timu; staru, kaj vidu la savon de la Eternulo, kiun Li faros al vi hodiaŭ; ĉar la Egiptojn, kiujn vi vidas hodiaŭ, vi eterne neniam plu vidos. La Eternulo militos por vi, kaj vi silentu.

Kaj la Eternulo diris al Moseo: Kion vi krias al Mi? Diru al la Izraelidoj, ke ili ekiru. Kaj vi levu vian bastonon kaj etendu vian manon super la maron kaj disfendu ĝin, por ke la Izraelidoj iru tra la mezo de la maro sur seka tero. Kaj jen, Mi obstinigos la korojn de la Egiptoj, kaj ili iros post vi; kaj Mi gloriĝos per Faraono kaj per lia tuta militistaro, per liaj ĉaroj kaj liaj rajdantoj. Kaj la Egiptoj sciiĝos, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi gloriĝos per Faraono, per liaj ĉaroj kaj liaj rajdantoj.

Kaj la Dia anĝelo, kiu iradis antaŭ la tendaro de la Izraelidoj, formoviĝis kaj ekiris post ili; kaj la nuba kolono formoviĝis de antaŭ ili kaj stariĝis post ili; kaj ĝi aperis inter la tendaro de la Egiptoj kaj la tendaro de la Izraelidoj, kaj ĝi estis nubo malluma, kaj lumis dum la nokto tiamaniere, ke unuj al la aliaj ne povis alproksimiĝi dum la tuta nokto.

Kaj Moseo etendis sian manon super la maron; kaj la Eternulo pelis la maron per forta orienta vento dum la tuta nokto kaj faris la maron seka tero; kaj la akvo disfendiĝis. Kaj la Izraelidoj ekiris tra la mezo de la maro sur seka tero, kaj la akvo estis por ili muro dekstre kaj maldekstre. Kaj la Egiptoj postkuris kaj venis post ili, ĉiuj ĉevaloj de Faraono, liaj ĉaroj kaj liaj rajdantoj, en la mezon de la maro. Kiam venis la matena gardotempo, la Eternulo ekrigardis la tendaron de la Egiptoj el la fajra kaj nuba kolono, kaj Li tumultigis la tendaron de la Egiptoj. Kaj Li depuŝis la radojn de iliaj ĉaroj kaj malrapidigis ilian iradon. Tiam la Egiptoj diris: Ni forkuru for de la Izraelidoj, ĉar la Eternulo militas por ili kontraŭ la Egiptoj.

Kaj la Eternulo diris al Moseo: Etendu vian manon super la maron, por ke la akvo revenu sur la Egiptojn, sur iliajn ĉarojn kaj iliajn rajdantojn. Kaj Moseo etendis sian manon super la maron, kaj la maro revenis en la komenco de la mateno, sur sian lokon, kaj la Egiptoj kuris renkonte al ĝi. Kaj la Eternulo ĵetis la Egiptojn en la mezon de la maro. Kaj la akvo revenis, kaj kovris la ĉarojn kaj la rajdantojn de la tuta militistaro de Faraono, kiu venis post ili en la maron; ne restis el ili eĉ unu.

Sed la Izraelidoj iris sur seka tero tra la mezo de la maro, kaj la akvo estis por ili muro dekstre kaj maldekstre.

Kaj la Eternulo savis en tiu tago la Izraelidojn el la mano de la Egiptoj; kaj la Izraelidoj vidis la Egiptojn mortintaj sur la bordo de la maro. Kaj la Izraelidoj vidis la grandan manon, kiun la Eternulo aperigis sur la Egiptoj, kaj la popolo ektimis la Eternulon kaj ekkredis al la Eternulo kaj al Lia sklavo Moseo.

Tiam Moseo kaj la Izraelidoj kantis ĉi tiun kanton al la Eternulo, kaj parolis jene:

¶ Antifono

-> ADORU 313.3

Al Di - o mi kan - tos,
for - te Li ma - ni - fes - tis sin.

Kantiko (Eli 14,13 - 15,1b)

Mi kantos al la Eternulo, ĉar Li alte leviĝis; *
Ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en la maron.
Mia forto kaj glorkanto estas la Eternulo, *
Kaj Li estis por mi savo. ¶

Mi kantos al la Eternulo, ĉar Li alte leviĝis; *
Ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en la maron.

Mia forto kaj glorkanto estas la Eternulo, *
Kaj Li estis por mi savo. ¶

Li estas mia Dio, kaj mi Lin gloros, *
La Dio de mia patro, kaj mi Lin altigos.

La Eternulo estas viro de milito, *
Eternulo estas Lia nomo. ¶

La ĉarojn de Faraono kaj lian militistaron Li ĵetis en la maron; *
Kaj liaj elektitaj militestroj dronis en la Ruĝa Maro.

> Abismoj ilin kovris; *
Ili falis en la profundojn kiel ŝtono. ¶

Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto, *
Via dekstra mano, ho Eternulo, disbatas malamikon.

Vi kondukis kun Via favorkoreco tiun popolon, kiun Vi liberigis, *
Vi kondukis ĝin per Via forto al Via sankta loĝejo. ¶

Vi venigos ilin, kaj plantos ilin sur la monto de Via heredo, *
Sur la loko, ho Eternulo, kiun Vi faris Via sidejo,

En la sanktejo, ho Sinjoro, kiun pretigis Viaj manoj. *
La Eternulo reĝos ĉiam kaj eterne. ¶

Ni preĝu.

Viaj praaj mirakloj, Dio, brilas ankoraŭ en niaj tagoj.
Kion tiam Via forta brako faris por unu popolo,
tion Vi nun faras por ĉiuj popoloj.
Tiam Vi liberigis Izraelon el la sklaveco de Faraono
kaj kondukis ilin tra la ondoj de la Ruĝa Maro.
Hodiaŭ Vi kondukas ĉiujn popolojn per la akvo de la bapto al libero,
por ke ĉiuj homoj fariĝu idoj de Abrahamo
kaj atingu la dignon de la elektita popolo
per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

aŭ:

Ni preĝu.

Dio, la mirakloj, kiujn Vi faris en la praaj tempoj,
ricevas pli profundan sencon en la lumo de la nova interligo.
La iro tra la Ruĝa Maro fariĝas tipo de la bapto,
per kiu Vi kondukas la kristanan popolon al libero.
Helpu, ke ĉiuj gentoj, partoprenante en la privilegio de Izraelo,
per la fido renoviĝu en Via Spirito.
Pri tio ni petas per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Legajo el la libro Jesaja

Ho Jerusalema, via Kreinto estas via edzo, Eternulo Cebaot estas Lia nomo; kaj via Liberiginto estas la Sanktulo de Izrael, kiun oni nomas Dio de la tuta tero.

Ĉar kiel virinon forlasitan kaj afliktitan en la spirito la Eternulo vin alvokis; kaj kiel edzinon de la juneco, kvankam forpuŝitan, diras via Dio. Por malgranda momento Mi vin forlasis, kaj kun granda kompatato Mi vin reprenos al Mi. En eksplodo de kolero Mi forturnis de vi Mian vizaĝon por momento, sed per eterna favorkoreco Mi vin kompatas, diras via Liberiginto, la Eternulo.

Ĉar tio estas por Mi kiel la akvo de Noa; kiel Mi ĵuris, ke Mi ne plu venigos la akvon de Noa sur la teron, tiel Mi ĵuris, ke Mi ne koleros vin nek insultos vin. Ĉar montoj forŝoviĝos kaj altaĵoj ŝanceliĝos; sed Mia favorkoreco ne foriĝos de vi, kaj la interligo de Mia paco ne ŝanceliĝos, diras la Eternulo, via Kompatanto.

Ho mizera, suferanta de ventego, senkonsola! jen Mi donos brilon al viaj ŝtonoj, kaj vian fundamenton Mi faros el safiroj. Kaj Mi faros viajn murdentojn el rubenoj kaj viajn pordegojn el kristaloj kaj ĉiujn viajn limojn el multekostaj ŝtonoj. Kaj ĉiuj viaj infanoj estos instruitaj de la Eternulo, kaj granda estos la bonstato de viaj filoj.

Per vero vi fortikiĝos; estu malproksima de premito, ĉar vi ne bezonas timi, kaj de teruro, ĉar ĝi ne alproksimiĝos al vi.

¶ Antifono

-> ADORU 313.4

IX^b Vi min le - vis, Sin - jor'.

Do mi glo-re Vin pri-kan-tos e - ter-ne.

el Psa 30

IX

— — — *

Mi gloros Vin alte, ho Eternulo, ĉar Vi levis min *
 kaj Vi ne lasis miajn malamikojn triumfi super mi.

Ho Eternulo, Vi ellevis el Ŝeolo mian animon; *
 Vi vivigis min, ke mi ne iru en la tombon. ¶

Kantu al la Eternulo, ho Liaj piuloj, *
 Kaj gloru Lian sanktan nomon.

Ĉar nur momenton daŭras Lia kolero, *
 Sed tutan vivon daŭras Lia favoro. ¶

Vespere povas esti ploro, *
 Sed matene venos ĝojego.

Vi anstataŭigis al mi mian plendon per danco; *
 Ho Eternulo, mia Dio, eterne mi Vin gloros. ¶

Ni preĝu.

Ho ĉiopova, eterna Dio.

Sanktigu Vian nomon.

Donacu al ni tion, kion Vi promesis al niaj prauloj pro ilia fido.

Plimultigu la nombron de Viaj gefiloj per la bapto;

por ke Via eklezio spertu, ke plenumiĝos tio,

kion la sanktuloj de la malnova interligo fide esperis.

Pri tio ni petas per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Legaja el la libro Jesaja

Ho vi, ĉiuj soifantoj, iru al la akvo, kaj vi, kiuj ne havas monon; iru, aĉetu, kaj manĝu; iru, aĉetu sen mono kaj sen pago vinon kaj lakton. Kial vi donas monon por tio, kio ne estas pano? kaj vian laboron por tio, kio ne satigas? aŭskultu do Min, kaj manĝu bonaĵon, kaj via animo ĝuu grasaĵon. Klinu vian orelon, kaj venu al Mi; aŭskultu, por ke vivu via animo; kaj Mi faros kun vi interligon eternan pri la fidindaj korfavoroj, promesitaj al David.

Jen Mi starigis lin kiel atestanton por la nacioj, kiel princon kaj ordonanton por la gentoj. Jen vi vokos popolon, kiun vi ne konas; kaj popolo, kiu vin ne konas, alkuros al vi, pro la Eternulo, via Dio, kaj pro la Sanktulo de Izrael, ĉar Li faris vin glora.


Serĉu la Eternulon, dum Li estas trovebla; voku Lin, dum Li estas proksime. Malpiulo forlasu sian vojjon, kaj krimulo siajn intencojn, kaj li returnu sin al la Eternulo, kaj ĉi Tiu lin kompatos, kaj al nia Dio, ĉar Li multe pardonas.

Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj, diras la Eternulo. Kiom la ĉielo estas pli alte ol la tero, tiom Miaj vojoj estas pli alte ol viaj vojoj, kaj Miaj pensoj ol viaj pensoj.

Ĉar kiel la pluvo kaj la neĝo falas de la ĉielo kaj ne revenas tien, sed malsoifigas la teron kaj naskigas kaj produktigas ĝin kaj donas semon al la semanto kaj panon al la manĝanto: tiel estos Mia vorto, kiu eliras el Mia buŝo; ĝi ne revenos al Mi vane, sed plenumos Mian volon, kaj sukcesos en tio, por kio Mi ĝin sendis.

¶ Antifono

-> ADORU 313.5



Vi ĉi-uj ĉer-pos ak-von, la ak-von de la
sav', kun gran-da ĝoj' el fre-ŝa font'.

Kantiko el Jes 12



Jen Dio estas mia savo: *
mi fidas, kaj mi ne timas;

ĉar Dio, la Eternulo, estas mia forto kaj mia kanto, *
kaj Li fariĝis mia savo. ¶

Kaj vi ĉerpos kun ĝojo akvon *
el la fontoj de la savo.

Kaj vi diros en tiu tago: / Danku la Eternulon, *
voku Lian nomon, ¶

sciigu Liajn farojn inter la popoloj, *
memorigu, ke Lia nomo estas alta.

Kantu al la Eternulo, / ĉar majestaĵon Li faris; *
tio estu sciata sur la tuta tero. ¶

Ĝojkriu kaj kantu, *
loĝantino de Cion;

ĉar granda estas inter vi *
la Sanktulo de Izrael. ¶

Ni preĝu.

Ho ĉiopova, eterna Dio,
unika espero de la mondo,
per la profetoj Vi anoncis la savo-farojn
kiuj sin plenumas en niaj tagoj.
Veku en ni la deziron servi al Vi ĉiam pli fidele,
ĉar neniuj progresas en la virto, se Vi ne inspiras lin.
Pri tio ni petas per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Legaja el la libro Baruĥ

Aŭskultu, ho Izrael, la leĝon de la vivo;
 aŭskultu kaj lernu, kio estas scio.
 Kial, Izrael, kial vi vivas en malamika lando,
 kial vi maljuniĝas en lando fremdula?
 Kial vi estas malpura kvazaŭ la mortintoj,
 kial vi alkalkuliĝas al la loĝantoj de Hadeso?
 Ĉar la fonton de la Saĝeco vi forlasis.
 Se vi restus sur la vojo de Dio,
 tiam por ĉiam en paco vi loĝus.
 Lernu, kie estas Saĝeco, kie forto,
 kie kompreno, kaj tiel samtempe vi lernu,
 kie la vivon vi trovos, multajn tagojn,
 lumon por la okuloj kaj pacon.
 Sed kiu trovis Ŝian loĝejon,
 kiu penetris en Ŝiajn trezorejojn?
 Nur la Ĉioscianto konas Ŝin.
 Lia scio malkovris Ŝin.
 Li kreis la teron por eterne
 kaj plenigis ĝin per bestoj kvarpiedaj.
 La lumon Li elsendas, kaj ĝi iras sian vojon,
 Li revokas ĝin, kaj ĝi obeas Lin timplene.
 Ĝoje brilas ĉiuj steloj en ilia noktogardo,
 Li vokas ili, kaj ili diras: Jen ni estas!
 Ĝojplene ili brilas por Li, kiu ilin kreis.
 Tio estas nia Dio,
 neniu alia povas rivali kun Li.
 Ĉiujn vojojn de la scio Li kaptis,
 kaj Li montris ilin al Sia sklavo Jakob,
 al Izrael, kiun Li amas.
 Post tio Ŝi aperis surtere
 kaj ekloĝis inter la homoj.
 Ŝi estas la leĝo, kiu staras por eterne.
 Kiuj observas Ŝin, tiuj vivos,
 kiuj ne sekvas Ŝin, tiuj trovas la morton.
 Konvertiĝu, Jakob, kaj kaptu Ŝin,
 trovu vian vojon al la lumo en Ŝia brilo.
 Ne fordonu vian gloron al aliaj,
 ne cedu vian privilegion al fremduloj.
 Feliĉaj estas ni, Izrael,
 ĉar al ni Dio malkovris, kio plaĉas al Li.

¶ Antifono → **ADORU 313.6**



el Psa 19



La instruo de la Eternulo estas perfekta, *
 ĝojigas la animon;

La atesto de la Eternulo estas certa, *
 ĝi saĝigas sensaĝulon. ¶

La ordonoj de la Eternulo estas justaj, *
 ĝojigas la koron;

La ordondiro de la Eternulo estas klara, *
 faras lumon antaŭ la okuloj. ¶

La timo antaŭ la Eternulo estas pura, *
 restas eterne;

La juĝoj de la Eternulo estas veraj, *
 kaj ĉiuj estas justaj. ¶

Ili estas pli dezirindaj, ol oro kaj ol multe da plej pura oro; *
 Ili estas pli dolĉaj, ol mielo kaj ĉelaraj mielgutoj.

Ankaŭ Via sklavo instruiĝis per ili; *
 Kiu ilin observas, tiu havas grandan rekompencon. ¶

Ni preĝu.

Dio, nia Patro,

Vi pliigas la nombron de Viaj infanoj,

kiujn Vi vokas el ĉiuj popoloj en Vian eklezion.

Protektu favore la en tiu ĉi nokto baptojn kaj ĉiujn baptojn,

por ke ni neniam folasu Vin, la fonton de la saĝeco.

Pri tio ni petas per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Legajaĵo el la libro Jeĥezkel

Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo, dirante:

Ho filo de homo! la domo de Izrael, loĝante sur sia tero, malpurigis ĝin per sia konduto kaj per siaj agoj.

Kaj Mi elverŝis sur ilin Mian koleron pro la sango, kiun ili verŝadis sur la teron, kaj pro tio, ke ili malpurigadis ĝin per siaj idoloj; kaj Mi disĵetis ilin inter la naciojn, kaj ili estis dispelitaj en la diversajn landojn; konforme al ilia konduto kaj al iliaj agoj Mi faris juĝon kontraŭ ili.

Kaj ili aliĝis al la nacioj, al kiuj ili venis, kaj malsanktigis Mian sanktan nomon tiel, ke oni diris pri ili: Ĉu tio estas la popolo de la Eternulo, kiu devis eliri el Lia lando? Sed oni domaĝis Mian sanktan nomon, kiun la domo de Izrael malsanktigis inter la nacioj, kien ili venis.

Tial diru al la domo de Izrael: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Ne pro vi Mi agas, ho domo de Izrael, sed nur pro Mia sankta nomo, kiun vi malsanktigis inter la nacioj, kien vi venis. Kaj Mi sanktigos Mian grandan nomon, malsanktigitan ĉe la nacioj, kiun vi malsanktigis inter ili; kaj la nacioj ekscios, ke Mi estas la Eternulo, diras la Sinjoro, la Eternulo, kiam Mi montros sur vi Mian sanktecon antaŭ iliaj okuloj.


Mi prenos vin el inter la nacioj, Mi kolektos vin el ĉiuj landoj, kaj Mi venigos vin en vian landon. Kaj Mi aspergos vin per pura akvo, kaj vi puriĝos de ĉiuj viaj malpuraĵoj, kaj de ĉiuj viaj idoloj Mi purigos vin. Kaj Mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan Mi metos en vin; Mi eligos el via korpo la ŝtonan koron, kaj Mi donos al vi koron karnan. Kaj Mian spiriton Mi metos en vin, kaj Mi faros, ke vi agados laŭ Miaj leĝoj, kaj Miajn ordonojn vi observados kaj plenumados. Kaj vi loĝos en la lando, kiun Mi donis al viaj patroj; kaj vi estos Mia popolo, kaj Mi estos via Dio.

¶ Antifono

-> ADORU 313.6



el Psa 42 kaj 43



Mia animo soifas Dion, *
la vivantan Dion; **

kiam mi venos kaj aperos ***
antaŭ la vizaĝo de Dio? ¶

Elverŝiĝas mia animo, kiam mi rememoras,
kiel mi iradis kun la granda hom-amaso, **

kaj kondukis ĝin en la domon de Dio,
ĉe laŭta kantado kaj glorado de festanta amaso. ¶

Mi diras al Dio, mia Roko: *
Kial Vi min forgesis? **

Kial mi iradas malgaja ***
pro la premado de la malamiko? ¶

Sendu Vian lumon kaj Vian veron, *
ke ili min gvidu, **

Ke ili alvenigu min al Via sankta monto ***
kaj al Via loĝejo. ¶

Kaj mi venos al la altaro de Dio, *
Al la Dio de mia ĝojo kaj ĝuo; **

Kaj mi gloros Vin per harpo, ***
ho Dio, mia Dio. ¶

Ni preĝu.

Dio, konstanta forto kaj lumo eterna,
rigardu favore Vian eklezion,
kaj realigu per ĝi la savon de la homoj.
Per ĝi la mondo ekkonu,
ke malnova fariĝas nova,
malhela iĝas luma,
morta releviĝas al vivo,
kaj ĉio resaniĝas en Kristo,
kiu mem estas la fonto de la vivo,
li, kiu vivas kaj regas ĉiam kaj eterne.

Amen.

aŭ:


Ni preĝu.

Dio, per la vortoj de ambaŭ testamentoj
Vi malfermas al ni la misteron de tiu ĉi Paska Nokto.
Helpu al ni kompreni Vian favorkorecon,
por ke ni ekkonu, kiom Vi jam donis al ni,
kaj firme ekspektu Viajn futurajn donacojn.
Pri tio ni petas per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Gloro-Himno

En la ĝojo de tiu ĉi nokto ni nun kantas la gloro-himnon kune kun – la sonoriloj
– la sonoriletoj
– kaj la orgeno



plena versio:

→ **ADORU 366**

aŭ unustrofe:

1. Al Dio sola estu glor'
kaj dank' pro Lia graco,
ĉar liberiĝis nia kor'
de ĉiu ajn minaco.
Favore Li rigardas nin.
Nun regas granda pac' sen fin'.
Konfliktoj devis ĉesi.

2. Vin benas nia laŭda preĝ';
pro Via glor' ni dankas,
ke Vi eterne estas reĝ';
potenc' al Vi ne mankas.
Pro Via forto sen mezur'
obeas homoj kaj natur'.
Ho, kia bona Estro!

3. Jesuo Kristo, sola Fil'
de Via Patro glora,
Vi, la unika kuracil'
por pek-malsan' dolora,
ŝafido Dia, Di-Sinjor':
Aŭskultu voĉon de l' angor',
kaj ĉiujn nin kompatu!

4. Spirito Sankta, alta don',
helpema konsolanto,
nun gardu ĉiujn de malbon',
al kiuj la Savanto
pardonis pro la kruc-dolor'.
Mizeron, timojn turnu for.
Ni firme Vin konfidas.

Al Di' en al - toj es - tu glor',
Ni laŭ - das, be - nas kun a - dor'
al ni sur te - ro pa - co.
Vin, Pa - tro, plen' de l' gra - co.
Ho Krist', Ŝa - fi - do, kom - pa - tu nin.
Ho Plej - al - tul', ni glo - ras Vin,
kaj Vin, Spi - ri - to. A - men.

E: Kloster Kirchberg 2011-04-07

aŭ:

Gloro al Dio en la altoj

→ **ADORU 042**

Resuma Preĝo

Ni preĝu.

Dio,

Vi heligis tiun ĉi nokton per la brilo de la resurekto de nia Sinjoro.

Bonvolu vekigi en Via eklezio la spiriton de la ideo, kiun Vi donacis al ni per la bapto; por ke ni renoviĝu korpe kaj anime, kaj servu al Vi kun sincera koro.

Pri tio ni petas Vin per Jesuo Kristo, Via Filo, nia Dia Sinjoro, kiu kun Vi, en la unueco kun la Sankta Spirito, vivas kaj regas nun kaj eterne.

Amen.

Legajo el la epistolo de la apostolo Paŭlo al la Romanoj

Ĉu vi ne scias, ke ni ĉiuj, kiuj baptiĝis al Jesuo Kristo, baptiĝis al lia morto?

Ni do estas entombigitaj kun li per bapto al morto,
por ke, kiel Kristo estas levita el la mortintoj per la gloro de la Patro,
tiel same ni ankaŭ iradu en noveco de vivo.

Ĉar se ni jam kuniĝis al la simileco de lia morto,
ni tiel same kuniĝos al la simileco de lia releviĝo,
sciante, ke nia malnova homo estas kun li krucumita,
por ke la korpo de peko estu neniigita,
por ke ni jam ne estu sklavoj al peko;
ĉar tiu, kiu mortis, estas pravigita pri peko.

Sed se ni mortis kun Kristo, ni kredas, ke ni ankaŭ vivos kun li;
sciante, ke Kristo, levite el la mortintoj, ne plu mortas;
la morto ne plu lin regas.


Ĉar mortante, li mortis al peko unufoje por ĉiam;
sed vivante, li vivas al Dio.

Tial ankaŭ vi vin kalkulu mortintoj al peko, sed vivantoj al Dio en Kristo Jesuo.

Jen la parolo de Dio.
Al Dio estu danko.


Haleluja

-> ADORU 313.9




aŭ:

-> ADORU 313.10



el Psa 118



Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona; *
ĉar eterna estas Lia boneco.

Izrael diru, *
ke eterna estas Lia boneco. ¶

La dekstra mano de la Eternulo estas alte, *
la dekstra mano de la Eternulo faras heroaĵojn.

Mi ne mortos, sed mi vivos, *
kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo. ¶

Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, *
fariĝis ŝtono bazangula.

De la Eternulo ĉi tio fariĝis, *
ĝi estas miraklo en niaj okuloj. ¶

Evangelio

Mat 28,1-10

La Sinjoro estu kun vi.
Kaj kun via spirito.

El la evangelio laŭ Mateo.
Gloro estu al Vi, Sinjoro.

Kaj sabate malfrue, kiam eklumis por la unua tago de la semajno,
venis Maria Magdalena kaj la alia Maria, por vidi la tombon.

Kaj jen okazis granda tertremo;
ĉar anĝelo de la Eternulo malsupreniris el la ĉielo,
kaj venis kaj derulis la ŝtonon,
kaj sidiĝis sur ĝi.
Lia aspekto estis kiel fulmo, kaj lia vestaĵo estis blanka, kiel neĝo;
kaj pro timo al li la gardistoj tremis, kaj fariĝis kiel malvivuloj.

Kaj la anĝelo responde diris al la virinoj:
Ne timu; ĉar mi scias, ke vi serĉas Jesuon, la krucumitan.
Li ne estas ĉi tie; ĉar li leviĝis, kiel li diris.
Venu, vidu la lokon, kie la Sinjoro kuŝis.
Kaj iru rapide, kaj diru al liaj disĉiploj:
Li leviĝis el la mortintoj,
kaj jen li iras antaŭ vi en Galileon; tie vi vidos lin;
jen mi sciigis al vi.

Kaj ili rapide foriris de la tombo kun timo kaj granda ĝojo,
kaj kuris, por sciigi al liaj disĉiploj.

Kaj jen Jesuo renkontis ilin, dirante: Saluton.
Kaj alveninte, ili ekprenis liajn piedojn kaj adorkliniĝis al li.

Tiam Jesuo diris al ili: Ne timu;
iru, diru al miaj fratoj, ke ili foriru en Galileon,
kaj tie ili min vidos.


Jen la parolo de la Sinjoro.
Al Kristo estu laŭdo.

3. LA LITURGIO DE LA BAPTO

Beno super la akvo

Karaj gefratoj!

Ni petas Dion, ke Li benu tiun ĉi akvon, per kiu ni estos aspergataj: memorigo pri nia bapto. Dio renovigu en ni Sian gracon, por ke ni restu fidelaj al la Spirito, kiun ni ricevis.



Ho Eternulo, nia Dio, estu proksime al Via popolo, //
kiu vigilante kaj preĝante celebras tiun ĉi paskan nokton.

Vi mire nin kreis, // pli mire redemptis nin.

Memorante pri Viaj grandaj faritaĵoj ni petas Vin:

Bonvolu beni ĉi tiun akvon: //
simbolo de Via zorgo por ni homoj.

En la komenco Vi kreis la akvon, por ke ĝi donu fekundecon al la tero //
kaj servu al la homoj kiel refreŝiga trinkaĵo kaj puriga bano.

Vi utiligis la akvon // por la verkoj de Via kompato:

Per la akvo de la Ruĝa Maro Vi liberigis Vian popolon el la sklaveco egipta. //
Per la akvo el la roko Vi kvietigis ilian soifon en la dezerto.

Per la bildo de la vivanta akvo la profetoj anoncis la novan interligon, //
farotan de Vi kun ni homoj.

Per la akvo, kiun Kristo sanktigis en Jordano-rivero, //
Vi purigas en la bano de la bapto la pekajn homojn,
donacante al ili la novan vivon de Viaj idoj.

Pro tio tiu ĉi akvo estu memorigo pri nia bapto.
Ĝi kunigu nin en paska ĝojo kun niaj gefratoj, kiuj estas baptataj en tiu ĉi sankta nokto, //
kaj kun ĉiuj, kiuj jam estas renaskiĝintaj
en akvo kaj Sankta Spirito al eterna vivo.

Pri tio ni petas // per Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Renovigo de la bapto-konfeso

Karaj gefratoj!

Dum la kvardek tagoj de Karesmo ni preparis nin por Pasko.

Entombigite kun Kristo kaj resurektinte kun Li, ni nun volas renovigi nian bapto-konfeson.

Do, mi demandas vin:

C: Ĉu vi kontraŭstaras kontraŭ Satano?

K: Mi kontraŭstaras.

C: Kaj kontraŭ ĉiu lia malico?

K: Mi kontraŭstaras.

C: Kaj kontraŭ ĉiuj liaj allogoj?

K: Mi kontraŭstaras.

C: Ĉu vi kredas je Dio, la ĉiopova Patro, la kreinto de la ĉielo kaj de la tero?

K: Mi kredas.

C: Ĉu vi kredas je Jesuo Kristo, Lia unu-naskita Filo, nia Sinjoro,
kiu naskiĝis el Maria la Virgulino, suferis, kaj estis entombigita,
releviĝis el la mortintoj, kaj sidas dekstre de la Patro?

K: Mi kredas.

C: Ĉu vi kredas je la Sankta Spirito,
la sankta katolika eklezio,
la komunumo de la sanktuloj,
la pardono de la pekoj,
la revivigo de la mortintoj,
kaj la vivo eterna?

K: Mi kredas.

C: La ĉiopova Dio, la Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo,
donacis al ni novan vivon el akvo kaj Sankta Spirito
kaj pardonis al ni ĉiujn niajn pekojn.
Per Lia graco Li konservu nin en Kristo Jesuo, nia Sinjoro, por la vivo eterna.

K: Amen.

Dum la aspergo

Kanto, ekzemple: Baptita estas mi por Di'

→ **ADORU 101.1-3**

aŭ: Dion ni, gefratoj, gloru

→ **ADORU 671.1-3**

Porpetoj

Ni preĝu al Jesuo Kristo, kiu resurektis en gloro
kaj volas esti kun ni ĉiujn tagojn ĝis la fino de la mondo:

Por ĉiuj kristanaj komunumoj, kiuj kune estas la unu eklezio ...
 Por ĉiuj, kiuj en tiu ĉi nokto estas baptataj ...
 Por tiuj, kiuj nin regas, administras, juĝas kaj protektas ...
 Por tiuj, kiuj ankaŭ hodiaŭ estas sen konsolo kaj sen perspektivo ...
 Por ni ĉiuj en niaj sukcesoj kaj problemoj, en niaj ĝojoj kaj suferoj ...
 Por niaj karaj mortintoj, ke ili estu por ĉiam feliĉaj en Vi ...

Per Vi ni gloras la Patron en la Sankta Spirito nun kaj eterne.
 Amen.

Pretigo de la Oferdonoj

Kanto, ekzemple: Al Di' tronanta estu glor'
 aŭ: Krist' per la Dia forto

→ **ADORU 314,1-3**

→ **ADORU 329.1-2**

Ofera Preĝo

Ho Eternulo, nia Dio,
 akceptu favore la preĝojn kaj oferojn de Via popolo,
 kaj donu,
 ke ĉi tiu paska soleno,
 kiu fontas en la ofero de la Ŝafido,
 konduku nin al la eterna savo.
 Pri tio ni petas per Li, Kristo, nia Sinjoro.
 Amen.

Prefacio: Enira Dialogo

→ ADORU 044.1

D: La Sin - jo - ro es - tu kun vi.

K: Kaj kun vi - a spi - ri - to.


D: Le - vi - ĝu vi - aj ko - roj.

K: Ni ha - vas i - lin ĉe la Sin - jo - ro.


D: Ni dan-ku al la Sin-jo - ro, ni-a Di - o.

K: Es - tas in - de kaj ju - ste.


Prefacio de Pasko




Ve-re estas inde kaj juste, ĝus-te kaj sa - ve,




ke ni ĉiam laŭdu Vin, sed precipe en ti-u ĉi tem - po,




kiam Kristo sin o - fe - ris ki - el ni - a Pas - ko.



Pe-re de Li la gefiloj de la lumo renaskiĝas al la no - va



vi - vo, kaj al la fi - de - lu - loj malfermiĝas la pordoj



de la ĉi - e - lo.




Li per propra morto liberigis nin de la eter-na mor - to,




kaj Lia revi - vi - ĝo fariĝis garantiaĵo por ni - a




re - vi - vi - ĝo.



Pro ti - o, per pleneco de la paskaj gracoj, ĝojas ĉiuj nacioj



sur la te - ro. An-kaŭ la ĥoroj de la anĝeloj kaj sank - tu - loj



kantas himnon de Via glo - ro, sen - fi - ne di - ran - te:

Sankta-Himno

ekzemple: Sankta, sankta, sankta (Schubert)

→ **ADORU 891**

aŭ: Sankta (Missa mundi)

→ **ADORU 045**

Ŝafido de Dio

ekzemple: Dia ŝafido

→ **ADORU 903**

aŭ: Ŝafido de Dio (Missa mundi)

→ **ADORU 049**

Danko-Kanto

ekzemple: La tago releviĝa

→ **ADORU 327**

aŭ: Ho Revivanto

→ **ADORU 321**

Postkomunia Preĝo

Ho Eternulo, nia Dio,
Vi fortigis nin per la paskaj sakramentoj.
Donacu al ni la Spiriton de Via amo,
por ke la Viaj fariĝu unu koro kaj unu animo
en Kristo, nia Sinjoro.

Amen.

Beno

-> **ADORU 050.1.3**




C: La Sinjoro estu kun vi.
K: Kaj kun via spirito.

C: Benu vin la ĉio - po - va Di - o:
la Pa - tro kaj la Fi - lo
kaj la Sankta Spiri - to. K: A - men.

Elsenda Voko

-> **ADORU 050.5**



D: I - ru en pac - o. Ha - le - lu - ja.
K: Al Dio estu dank - o. Ha - le - lu - ja.

Ha - le - lu - ja.
Ha - le - lu - ja.